

100 Jahre Deutsche Esperanto-Bibliothek

Stadtbibliothek Aalen eröffnete Ausstellung anlässlich des Jubiläums

Rund 90 Besucher waren am 13. September zum Festakt gekommen, mit dem die Stadt Aalen die Esperanto-Ausstellung eröffnete, die anlässlich des 100-jährigen Bestehens der Deutschen Esperanto-Bibliothek gezeigt wird.

Zu sehen sind die Exponate in vier Schaukästen im ersten Stock der Bibliothek. Sie wurden vom Direktor der Esperanto-Bibliothek Utho Maier und seinen Mitarbeitern aus den gut 40 000 Einheiten, die die Bibliothek bisher gesammelt hat, ausgewählt. Sie zei-



gen das breite Spektrum der Esperanto-Literatur: Es reicht von den ersten Lehrbüchern aus dem 19. Jahrhundert über Grammatiken und Wörterbücher bis hin zu *Asterix*-Übersetzungen und druckfrischen Zeitschriften.

Die Eröffnung der Ausstellung zog in Aalen das Interesse der Öffentlichkeit und der Medien auf sich. Mit der Bibliothek, die zu den bedeutendsten Esperanto-Bibliotheken der Welt – die nächsten sind in Wien und Rotterdam – gehört, hat die schwäbische Stadt eine



in Deutschland einmalige Einrichtung, durch die sie in Esperantokreisen weltweit bekannt wurde.

Der Leiter der Stadtbibliothek Michael Steffel dankte Maier und den Mitarbeitern der Esperanto-Bibliothek für ihr Engagement für die Stadtbibliothek und die Stadt Aalen.

Alfred Schubert



Sprachplanung nicht erst seit Esperanto

Prof. Dr. Martin Haase hielt Festvortrag über die Entstehung von Sprachen

Ob eine Sprache als „natürlich“ oder als „künstlich“ empfunden wird, hängt sehr stark von der Zeit ab, die seit ihrer Einführung vergangen ist. Dies erklärte Professor Dr. Martin Haase in seinem Festvortrag, den er am 13. September anlässlich der Feier des 100-jährigen Bestehens der Deutschen Esperanto-Bibliothek in der Stadtbibliothek von Aalen hielt. Anhand der Entstehung und der Entwicklung des Italienischen, Spanischen und Französischen zeigte Haase den Einfluss von Dichtern und Gelehrten auf die Sprache. Letztendlich seien diese Sprachen auch geplant worden. Allerdings vor so langer Zeit, dass dies in Vergessenheit geraten ist. Esperanto hat also gute Aussichten, irgendwann auch als natürliche Sprache gesehen zu werden. *A. Schubert*



Zugriff auf 40 000 Einheiten

Dokumentation ermöglicht ein schnelles Auffinden aller Bücher und Zeitschriften

Die Deutsche Esperanto-Bibliothek ist in den Räumen der Stadtbibliothek Aalen untergebracht. Am 8. Juli 1989 wurde der Vertrag über die Zusammenarbeit von Oberbürgermeister Ulrich Pfeifle (Mitte), Helga Windisch, Wolfgang Schwanzer, Dr. Werner Bormann und Karl Heinz Schaeffer (von links)



unterscriben. Die Bestände der Bibliothek gingen damit als Dauerleihgabe an die Stadt Aalen. Eigentümer blieb aber weiterhin das Deutsche Esperanto-Institut. Neben den Räumlichkeiten stellte die Stadt der Esperanto-Bibliothek auch eine kompakte Regalanlage zur Verfügung, deren Fassungsvermögen bis heute ausreicht.

Die Regalbretter der Bibliothek sind rund 450 Meter lang. Die bisher dort eingestellten gut 40 000 bibliographischen Einheiten – größtenteils Bücher und Zeitschriften – füllen rund drei Viertel des Platzes. Alle eingehenden

Stücke werden nicht nur in einem Eingangsbuch verzeichnet, sondern auch nach einem System klassifiziert, das an die Erfordernisse der Bibliothek angepasst wurde. Durch den im Computer abgespeicherten Katalog ist es möglich, den Standort jedes einzelnen Stücks schnell zu ermitteln. Dies stellte Geschäftsführer Karl Heinz Schaeffer bei einer Führung durch die Bibliothek unter Beweis: In weniger als einer Minute hatte er die Nummer 2007/1 von *Esperanto aktuell* gefunden und zog sie für ein Foto aus dem Regal.

Alfred Schubert

El la estraro

La sekvaj informoj spegulas la staton de komence de septembro. Kiam tiu ĉi numero de *Esperanto aktuell* aperos, la estraro estos kunveninta, sed kompreneble la rezultoj povos aperi nur en la lasta eldono de la jarkolekto.

DVD kun varbfilmetoj ne aperis

Pro tro malmultaj antaŭmendoj la anoncita DVD „Esperanto estas ...“ kun varbfilmetoj pri Esperanto ne aperis. La prezidanton de Germana Esperanto-Asocio (GEA) atingis kelkaj mendoj, sed vane. Se la DVD pli poste tamen estos produktita, ĝi estos liverata al la mendintoj.

Germanaj Kongresoj en 2009 kaj 2010

La preparo de la Germanaj Esperanto-Kongresoj en 2009 (Herzberg, kune kun la Eŭropa Kongreso) kaj en 2010 (Kaiserslautern) jam nun postulis multajn diskutojn kaj decidojn. La problemoj estas ĉefe, kiel allogi multajn partoprenantojn sen tro altigi la partoprenkotizojn. Por ke ankaŭ junuloj venu, la estraroj de GEA kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ) fiksas tre malaltan kongreskotizon por GEJ-membroj. GEA zorgos por malmultekosta amasloĝejo kun eblo, prepari siajn manĝojn mem. GEJ respondecos por specifa junulara programo, la vesperajn prezentaĵojn oni ĝuu kune kun la pliaĝuloj.

Vigla amaskomunikila ĉho

Sekve de la 100jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la Universala Kongreso en Roterdamo okazis pluraj intervjuoj (WDR5, Bayern 2, retmagazino Cicero) kaj aperis diversaj gazet-artikoloj. La Centra Artikolo, kiun verkis Thomas Sandner, kaŭzis deklaron da raportetoj en lokaj ĵurnaloj, rimarkebla sukceso de vasta kunlaboro de estraranoj, komisiitoj kaj lokaj aktivuloj.

„iDiS“ progresas

Kvankam ne tiom rapide kiel atendite, sed konstante la verkado de la nova administra sistemo „iDiS“ progresas. La

estraro esperas, transpreni la membro-datumojn ĝis fine de septembro, sed necesos multa kroma laboro por aktualigi longe ne plu uzitajn informojn. Precipe la stato de la lokaj grupoj kaj ilia membraro estas en multaj kazoj ankoraŭ neklara.

Kategorio de subtenantaj membroj reaktivigita

Sekve de la diskuto pri la optimuma strukturo de GEA la estraro reaktivigis la membrokategorion S (subtenanta membro), kiu taŭgas por tiuj, kiuj pro iaj kaŭzoj ankoraŭ ne volas esti ordinarnaj membroj, ekzemple, ĉar ili volas nur subteni la ideon de Esperanto, sed ne lerni ĝin. Oni tiam povas regule aŭ unufoje donaci certan sumon aŭ eĉ nur subskribi, ke oni volas esti subtenanta membro. La administrado de tiu kategorio eblos tamen nur en la kadro de iDiS. Mankas ankaŭ ankoraŭ koncerna retpaĝo.

GEA-estraro ekuzas vikiojn

Por la pli bona interna reciproka informado kaj decidado Jörg Gersonde instalas t.n. „vikion“, t.e. reta anonc-tabulo, al kiu ĉiu allasito povas kontribui. Roland Schnell atentigis ankaŭ pri publikaj vikioj, kie Lars Sözüer, komisiito por rondvojaĝoj, nun instalas organizan platformon por la gastigantoj de rondvojaĝantoj. En tiu povas partopreni ĉiu interesato.

Varbkarteto

Aldone al la faldfolioj Sebastian Kirf produktis tre allogan varbkarteton, kiu estas por amasa disdonado. Ĝi jam estas elprovita kaj trovis vastan atenton. Rigardu ĝin sub la ret-adreso <http://www.esperanto.de/deb/werbematerial/>

Kunsidoj de la estraro kaj de la konsilantaro

La planita estrarkunsido je la 27a de septembro devis esti ŝovata al la 18a de oktobro. La konsilantaro de GEA kunvenos la 15an de novembro en Herzberg la Esperanto-urbo. Komuna estrarkunsido de GEA kaj GEJ estos kadre de la Internacia Seminario je la 28a de decembro en Biedenkopf.

Wochenende für Aktive

Im November treffen sich Aktive in Herzberg – die Esperanto-Stadt zum Verbandsrats-Wochenende.

Programm: Freitag, den 14.11.2008: 19.30 Beginn der Veranstaltung und Begrüßung, 20.30 Kio nova en la Esperanto-urbo? (Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar); Samstag, den 15.11.2008: 9.00 aktuala stato de la administra sistemo iDiS (Rudolf Fischer), 9.30 Entwicklung von *Esperanto aktuell* (Alfred Schubert), 10.00 La unuopaj landaj ligoj raportas: specialaj aktivecoj en la diversaj federaciaj landoj kun specialaj rigardoj al la aktivecoj rilate la eŭropajn balotojn en 2009 (la unuopaj reprezentantoj de la landaj ligoj anoncu sin ĉe Wolfgang Bohr), 12.30 Mittagessen, 14.00 E-D-E informiert über seine Aktivitäten im Europa-Wahljahr (Alfred Schubert), 15.30 Kaffeepause, 16.00 Stato de la harmoniigo de la landaj statutoj kun la federacia (Rudolf Fischer), 17.00 Informoj de GEA, proponoj de la ligoj (gvidos: Rudolf Fischer), 18.00 Abendessen, 19.30 Ein weiteres Jubiläum im nächsten Jahr: das PSI wird 25 (Jörg Gersonde), anschließend freie Aussprache; Sonntag, 16.11.2008: 9.00 EEU-kongreso en Herzberg: aktuala stato de la preparado. (Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar), 10.00 Wie geht's weiter mit dem Verbandsrat (Wolfgang Bohr), 11.00 Vizito al la muzeo de la kastelo Herzberg (libervola), 12.00 Ende der Veranstaltung. Ein Teilnehmerbeitrag wird nicht erhoben. Die Kosten für Fahrt, Übernachtungen und Verpflegung muss jeder Landesverband selbst tragen. Die Kosten sind steuerlich absetzbar, wenn sie an den Landesverband gespendet werden. Übernachtungsempfehlung: Hotel *Jägerhof*, Sägemühlenstr. 34, 37412 Herzberg (Tel. 05521/3067), 15 Betten zu je ca. 40 € mit Frühstück. Bitte buchen Sie Ihr Zimmer selbst im Hotel. Die Tagung findet im „Haus der Begegnung“ statt. Anmeldung bei: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, 53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Tel. 02641/4885, Netzadresse: wolfgang.bohr@esperanto.de

Tradicia percepto de la planlingva demando far la svisa gazetaro

Prelego de Andreas Künzli, prezenta okaze de la 1a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, la 28an de majo 2008 en Vilno (Litovio).

La nacilingva gazetaro de Svislando frue interesiĝis pri la demando de neŭtrala universala lingvo kaj ne hezitis raporti pri ĝi. Neŭtralaj universalaj lingvoj signifis por la samtempoj ĉiam interesan aŭ iom kuriozan objekton, kaj ne mankis ardaĵoj pledoj por kaj kontraŭ la afero mem kaj ĝiaj protagonistoj. Inter la unuaj lokaj gazetoj, kiuj skribis pri la temo, troviĝis ekzemple *Journal du Locle* (ekz. en 1908), *Neue Zürcher Zeitung* (1909), *Nebelspalter* (1911), *Tagblatt der Stadt Thun*, *Thalwiler Anzeiger*, *Ostschweizerisches Wochenblatt*, *St. Galler Tagblatt* (ĉiuj 1912), *Burgdorfer Tagblatt*, *Le Journal de Genève* (1913), *Tribune de Genève* (1917) k.a. En 1913 *Der Bund* (Berne) detale raportis pri la 9a Universala Kongreso de Esperanto, ankaŭ *Neue Zürcher Zeitung* dediĉis al tiu evento plurajn artikolojn, same pluraj svisaj, ankaŭ alemanaj gazetoj menciis la planlingvajn diskutojn ĉe Ligo de Nacioj en la 20aj jaroj (ekz. *NZZ*, 14.9.1922 kaj 23.9.1922). En 1939 *Der Bund* produktis specialan suplementon pri la UK okazinta tiujare en la svisa ĉefurbo. Sendube plej multaj artikoloj aperis en svisaj gazetoj okaze de universalaj kongresoj, do en 1913, 1939, 1947 kaj 1979. Per tio ili konsiderinde kontribuis al la disvastiĝo de la atento pri la mondlingva ideo flanke de vasta publiko.

Ankaŭ post la dua mondmilito la gazetaro daŭrigis vigle verki pri la internacilingva demando. Sufiĉe bonaj artikoloj estis publikigitaj en la 50aj jaroj lige kun la Esperanto-rezolucio de Unesko aŭ kun la inaŭguro de Salono Edmond Privat en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds post lia morto en 1962. En la 30-40aj jaroj kaj ankaŭ

poste precipe *L'Essor*, *Le Nouvel Essor*, *La Sentinelle* kaj *Le Coopérateur genevois* aperigis la artikolojn de Edmond Privat. Dank' al la klopodoj de Arthur Baur, kiu dum jardekoj eldonis la gazetan servon *Esperanto-Information* de SES, kaj de Tina Peter-Rüetschi en *NZZ* povis aperi de tempo al tempo tre trafaj artikoloj pri Esperanto kaj la internacilingva demando.

La tenoro de la nacilingva gazetaro en Svislando rilate al Esperanto ĝenerale estis pozitiva aŭ bonvola, neŭtrala, informa, scivolema, afabla, respektama, aŭ skeptikema. Negativaj kaj polemikaj kontribuoj estis unuopaj, kompare maloftaj, kaj evidentiĝis, ke ĝiaj verkintoj ofte estis ne sufiĉe serioze dokumentitaj. Inter la plej strangaj titoloj eblis legi ekzemple *Esperanto - eine Sprache sucht Sprecher* (*Basler Zeitung*, 4.8.1981), *Esperanto: Hoffen auf bessere Zeiten* (*Basler Zeitung*, 10.8.1981), *Weltsprache ohne Zuhörer* (*Berner Zeitung*, 14.7.2003), *Esperanto als Retortenprodukt* aŭ simile. Alia artikolo en *Berner Zeitung* (29.12.1981) portis la titolon *Irreale Idealvorstellung? Weltsprachen auf der Suche nach Anerkennung*. Por *Basler Zeitung* Esperanto signifis esperon de filologoj (*Eine etwas angegraute Philologenhoffnung*, 11.1984) aŭ simple artefaritan lingvon sen kultura fono (*Kunstsprache ohne kulturellen Hintergrund*, 7.10.1982), falsa argumento ofte aŭdata kaj ripetata, ĉar plej ofte mankas la necesaj kondiĉoj kaj difinoj en tiuj kazoj. En *St. Galler Tagblatt* (14.6.2000) oni povis legi pri Esperanto kiel senanima konstruaĵo (*seelenloses Konstrukt*). En sia eldono de 25.11.1986, *NZZ* por iu pritema artikolo trovis jenan titolon, alude al la kompleta fiasko de Esperanto: *Globale Marktkommunikation – der grösste Flop seit Esperanto*.

Komparante artikolojn en samaj gazetoj de diversaj periodoj, oni povas

konkludi, ke kutime tiuj samaj gazetoj ne estis liberaj de akraj kontraŭdiroj. *Luzerner Neuste Nachrichten* malkovris en la esperantistoj specon de konspirantoj (24.2.1986): *Einer Verschwörung nicht unähnlich versammelten sich die Vereinsmitglieder und hielten ihre GV in Esperanto ab*. Sed 11 jarojn antaŭe (5.9.1975) *LNN* devis almenaŭ konfesi, ke finfine oni ne povas multon diri kontraŭ tia artefarita mondlingvo: *Viel wird gegen eine solche 'künstliche' Weltsprache eingewendet, wenig lässt sich aber tatsächlich einwenden*. Certe ne mankis ankaŭ atakoj kontraŭ la protagonistoj de Esperanto mem: Ekzemple por la revuo *Femina* (12.7.1978) la esperantistoj estis ne pli ol speco de sekto: *Der Klub der Unentwegten mit der seltsamen Sprache (... das tönt nach Sekte)* kaj prezentis kiel lingvan ekzemplon *Fihundo* heisst *Sauhund*. En la sama periodaĵo sekvis letero de legantino, kiu rekomendis lerni Interlingva anstataŭ Esperanto.

Interesa fenomeno ĉe la gazetaro raportanta pri Esperanto koncernas la metaforan uzadon de la nocio Esperanto en pluraj kunteksto. Jen kelkaj ekzemploj: Lige kun la flugado en la kosmon dum la 60aj jaroj aperis la vorto *Weltraumesperanto* (*Brückenbauer*, 4.11.1966). Kiam oni skribis pri la lingvo *Fanakalo* kiel ligilo de la blankaj kaj nigraj minejaj laboristoj en Sudafriko, la gazetaro parolis pri *Minen-Esperanto* (*Der Landbote*, 2.11.1967). Lige kun gestikulado en sporto estis uzita la esprimo *L'Espéranto du basketball* (*Radio TV*, 15/1976). Kiam aperis la planlingvo *Rumanĉ Griŝun*, iuj gazetoj parolis pri *Esperanto-Romanisch*, *Bündner Esperanto* respektive *un espéranto romanche* (*Construire*, 8.8.1990). En alia kazo, la angla lingvo estis nomita *Anbandelungesperanto* por eksterlandaj virinoj, kiuj en siaj ferioj flirtas kun grekaj viroj, uzante pli malpli lertan

anglan lingvaĵoj (NZZ, 23.8.1979). La angla lingvo en la rolo de la nova Esperanto de la eŭropanoj (*Blick* 22.9.1988, *Le Démocrate*, 20.9.1988) kaj de *eidgenössisches Esperanto* aŭ kiel *Esperanto der Eidgenossen* ankaŭ estis aktuala temo de tempo al tempo lige kun la diskuto pri la *lingua franca* (ekz. NZZ, 30.10.1979; *Oltnet Tagblatt*, 11.2.1988; *Schweizerische Kaufmännische Zeitung*, 23.9.1988); la ekvivalento franclingva *espéranto fédéral* estis renkontebla ekzemple en *Le Courrier Uvacim* (8/1980). La gazeto *Grenzpost am Zürichsee* (16.10.1987) vidis la anglan lingvon kiel *Parlaments-Esperanto*, *Blick* (22.9.1988) kaj *Le Démocrate* (20.9.1988) eĉ proklamis la anglan lingvon kiel novan Esperanton de la eŭropanoj, aŭ skribis: *Anglais: moderne espéranto* (*L'Hebdo*, 22.9.1988). Krome la vorto Esperanto aperis jen kaj jen en kunteksto de la diskuto pri la enkonduko de la angla lingvo en la bazajn lernejojn. La lucerna gazeto *Vaterland* (3.8.1979) uzis la terminon Esperanto por la koncepto de *Gross-Familie-Sprache*. La hispana lingvaĵo uzata en Meksiko estis nomita *Esperanto-Spanisch* (*Blick*, 17.6.1986), kaj la specifa varianto de la angla lingvaĵo, kiel ĝi estas utiligata en flughavenoj, ricevis la mokesprimon *désespéranto* (*La Romandie*, 19/1986). Tiu vorto estis utiligata ankaŭ en la senco de malfacile tradukeblaj esprimoj (*L'Est Vaudois*, 8.5.1989). Se oni ne plu komprenis la fenomenojn de la naturo, oni skribis: *Die Sprache der Natur ist zu einem Esperanto geworden, das niemand versteht* (*Berner Oberländer Nachrichten*, 7.6.1979).

La sekva ŝerco, kiu aperis en *Nebelspalter* (30.1.1979) cirkulis inter kritikantoj de Esperanto: Filo: Paĉjo, kio estas Esperanto? Paĉjo: La ĝenerala mondlingvo. Filo: Kaj kiu parolas ĝin? Paĉjo: Neniu.

Multajn jarojn poste, *Blick* eĉ aperigis bildstrion samsencan kaj samcelan (15.7.1998).

Lige kun la egalrajtoj de virinoj aperis la metaforo *Emanzenesperanto* (*Aargauer Tagblatt*, 7.3.1986). Komik-

soj senhezite estis denuncitaj kiel *Esperanto por senalfabetuloj* (*Schweiz. Mechaniker Zeitschrift*, 12/1987; *Basler Zeitung*, 25.9.1991) kaj *Pictogramme – das Esperanto der Orientierung?* estis legebla kiel demando en la revuo *Industrie-Flash* (5/1987). Eĉ religian rolon aŭ idealigon Esperanto ricevis en *L'Hebdo* (6.12.2001): *Amen: espéranto de la foi*, kaj en *Echo Magazine*, (Genève, 5.6.2003), kiu titolis iun artikolon per *L'esprit pentecôte – un espéranto spirituel*. Ankaŭ por sportistoj la nomo Esperanto kaptis specialan signifon, nome *Muskel-Esperanto*, se temis pri aktivecoj de sportorganizoj (*Das Magazin* 4/2002). Krome Esperanto kiel metaforo estis uzata en la kazo de *Bhangra – das musikalische Esperanto der Exil-Inder*, kiam tiuj aplikas diversajn stilojn en sia tradicia muziko (*Luzerner Neuste Nachrichten*, 1.3.1989 kaj 15.8.1989). En aliaj kazoj, en *Basler Zeitung* (29.11.1997 resp. 6.12.2000) la terminoj *visual esperanto* kaj *Foto-Esperanto* estis uzitaj por esprimi la universalan lingvon en ĵaz-muziko kaj en fotografado, NZZ (17.5.96) analoge utiligis la titolon *Festival-Esperanto* por filmo. Lige kun la spektaklo *Urfaust*, NZZ (29.10.1993) enkondukis la esprimon *Taubstommen-Esperanto* (t.e. por surdmutuloj) kaj *Esperanto als Körpersprache* (kiel gestoj) vidis *Aargauer Tagblatt* (21.12.1991) en la spektaklo *Antigone* de Sofoklo. La firmao *Charles Vögele* uzis la esprimon *Esperanto in Blue* por iu serio de vestaĵoj (*Zolliker Bote*, 25.3.1988), kaj en *Brückenbauer* (27.6.2000) Esperanto ricevis metaforan signifon ankaŭ por Fussball.

Kiam la komputiloj kaj la novaj komputilaj lingvoj fariĝis popularaj, ne malofte Esperanto estis metafore uzata por komputilaj lingvoj (*Computer-Esperanto*): lingvoj kiel Java (*un espéranto logiciel*, *LNQ*, 4.11.1997) aŭ telekomunikaj normoj kiel *EDIFACT*, *X.400* aŭ la *ASCII*-kodo ricevis tiam la metaforon de Esperanto informadika (*Eine Art Esperanto der Telekommunikation, elektronisches Esperanto, globales Esperanto des Computerzeital-*

ters ktp., en: *Computerworld Schweiz*, 11.3.1987; *Appenzeller Tagblatt* kaj *Der Landbote*, 14.11.1989; *Management Zeitschrift*, 1/1990; *Tages-Anzeiger*, 18.3.1991). Por *L'Hebdo* (11.11.1988), la sistemo *UNIX*, por *Gazette de Lausanne* (15.4.1987) la sistemo *Ada* signifis entute *l'espéranto des ordinateurs*, kaj reprezentanto de *IBM* esprimis la esperon, ke ĝia normo *X/Open* pli sukcese disvastiĝos ol la lingvo Esperanto (*Höfner Volksblatt*, 29.7.1988). La softvaro *Groupware* estis nomita de *BCOM informatique* (4/2001) *espéranto nouveau*. Finfine *Brückenbauer* (25.4.2000) difinis la nocion *Cyberslang* kiel specon de Esperanto, per kiu en la globala mondo oni povas interŝanĝi bazajn informojn.

La metafora uzado reaktualiĝis lige kun la „nova babelata turo” en Eŭropo (ekz. *Sprachenbabylon Brüssel* en *Badener Tagblatt*, 2.10.1993). Lige kun tiu temo Esperanto estis uzita en la senco *Einheits-Europäisch* (*BAZ*, 13-14.2.1999; NZZ, 28.4.1999). Iuj gazetoj eĉ reelfosis la nomon *Volapük* por karakterizi precipe la terminologian konfuzon en Eŭropa Unio (*Tages-Anzeiger*, 30.12.1992). Ne estas do miraklo, ke ankaŭ la nova monunuo *Euro* estis titolita per *Esperanto-Mono*. Pri ĝi kiel fi-mono la konata germana verkisto Martin Walser trovis siaspecan komparon: *Der Euro eröffnet das Zeitalter des praktischen Esperanto. Er ist ein Ungeld wie das Esperanto eine Unsprache ist.* (*Tagblatt St. Gallen*, 3.1.2002). *Zeitlupe* (4/1998) esprimis la esperon, ke la lingva riĉeco pluvivos malgraŭ ia eventuala *Euro-Esperanto*. *Nebelspalter* (9.10.1995) taksis, ke privatigita *Bundeswehr* estas *Esperanto-armeo*.

En la 1980aj jaroj iuj gazetoj kiel *Basler Zeitung*, *Bieler Tagblatt*, *Schweizerisches Kaufmännisches Zentralblatt* k.a., deklaris Esperanton kaj la planlingvan movadon senŝancaj kaj ne funkcipovaj. Por *Bündner Zeitung* (27.5.1987) Esperanto ĉiukaze estis nenio alia ol *Retortenprodukt*. Malgraŭ tiu negativa pritakso, okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987 sen-

nombraj periodaĵoj trovis inde pozitive raportoj pri lingvo kaj movado, eĉ *Jüdische Rundschau*, *Das Gelbe Heft* kaj *Meyers Modeblatt*. La centjariĝo de Edmond Privat, kiu estis ripete menciita en pluraj gazetoj, konkludis en 1989 tiun jardekon. En la 90aj jaroj la tono de iuj gazetoj al Esperanto akriĝis en la negativan, ironian direkton, tiel ke la esperantistoj ne nur devis sin pli vigle defendi kontraŭ plej diversaj atakoj flanke de la amaskomunikiloj, sed tiel ke oni devis subkompreni, ke gazetoj kiel *NZZ* kaj *Le Nouveau Quotidien* proklamis Esperanton definitive fiaskinta kaj morta aŭ almenaŭ ridinda kaj por la nuntempo ne plu alloga ideo (ĉar la angla lingvo venkis ktp.). Akran protestreagon flanke de la konsternitaj esperantistoj kaŭzis iu fuŝa mokartikolo de Marc Lacaze en *Le Nouveau Quotidien* (24.11.1991). Kiel alian ekzemplon de samspeca ironia fiartikolo en la senco de nekrologo eblas mencii *Nachruf aufs Esperanto* en *NZZ-Folio* (10/1994). Ankaŭ ĉi tiu publikigo ne restis sen adekvata reespondo de esperantistoj.

Sed almenaŭ la romanda gazeto *Le Matin* (22.10.1995) ŝajne iom komplete trovis atentiginde, ke *Non, l'espéranto n'est pas mort*.

Se do Esperanto ankoraŭ ekzistas, tiam laŭ Susann Sitzler, libera ĵurnalistino svis-devena, vivanta en Berlino, maksimume kiel slango de diversaj amikaroj, simplaj homoj kaj internaciaj familioj vivantaj en la periferioj de germanaj urboj. Malgraŭ ia simpatio, por tiaj 'modernaj' ĵurnalistoj, kies skribstilo estas same brila kiel sarkasma, Esperanto estas primokinda kiel ne plu tempo-konforma strangaĵo, reprezentanta la eternan kliŝon de la teda, iel justa afero (*Weltwoche*, 22.7.1999). Jam en 1990 iu regiona zurika gazeto plendis pri la misformiĝo de la lingvouzo (*Kauderwelsch*) kaj pri *Echtes Zürcher Inglesi-Esperanto* kiel kurioza slang-lingvaĵo de zurikaj gejunuloj.

Krom pri la monda lingvoproblemo, pri la fremdlingva instruado kaj Esperanto ĝenerale aŭ Esperanto en lernejoj, la gazet-redakcioj pretis publikigi

ankaŭ raportojn pri unuopaj esperantistoj, kiuj vekis apartan publikan atenton (krom pri Serge Reverdin alias Parzival' ankaŭ pri Dante Bertolini, Friedrich Bierhoff, Edmond Privat, Madeleine Stakian k.a.). Aperis ankaŭ sciigoj, ke eblas vojaĝi pere de Esperanto, aŭ pri okazaĵoj de SES kaj de lokaj Esperanto-societoj, inkluzive de lingvokursoj, kiel ekzemple en *Coopération* en oktobro 1953. Komence de la 90aj jaroj la gazetaro raportis pri la sorto de N.I. Sequoyah (Billy Ray Waldon), ĉeroka indiano kaj esperantisto, kiu en 1992 en Kalifornio estis kondamnita al la mortpuno. Pri lia nesolvita sorto interesiĝis krom zurikaj esperantistoj ankaŭ Olivier Tzaut (vd. ankaŭ *HeKo*, n-ro 247, reta eldono).

Kie ekzistis aktivaj Esperanto-agaĵoj, ekzemple en La Chaux-de-Fonds (KCE/CDELI), Lucerno, Wil, Biel-Bienne, Tiĉino ktp., tie aperis plej ofte artikoloj en la loka gazetaro. La efiko de la iom bizaraj aktivecoj de Serge Reverdin alias Parzival' en Biel-Bienne, pri kiuj la loka gazetaro ofte kaj volonte, sed ironie raportadis, estis ke fakte multaj homoj aŭdis diversmaniere pri Esperanto, kvankam oni opinias la aferon iom stranga. Kiam la gazetartikoloj alprenis tro mokan kaj sarkasman tonon, tiel ke la risko ridindigi la aferon de Esperanto reale ekzistis, la Esperanto-responsuloj ne timis interveni ĉe gazetredakcioj aŭ urbaj aŭtoritatoj por atentigi, ke Reverdin ne estas reprezentita persono de la Esperanto-movado.

Negativaj kontribuadoj havis kelkfoje ankaŭ la efikon, ke iuj aŭtoroj pli profunde okupiĝis pri la planlingva temo, ol se gazeto simple presis novaĵon de agentejo. Nova institucio kiel KCE en La Chaux-de-Fonds kompreneble provokis la lokajn ĵurnalistojn raportoj ne nur plaĉe kaj flate, sed ankaŭ kritike kaj ironie. Tiel en *L'Impartial* (6.8.1985) oni povis legi inter tute pozitivaj konsideroj pri Esperanto ankaŭ la verdikton, ke tiu lingvo ne savos la mondon: *L'espéranto ne sauvera pas le monde*.

Kiam la esperantistoj sentis sin maljuste traktitaj, la plej kompetentaj inter ili (ĉefe Claude Piron, Claude Gacond,

Mireille Grosjean, Arthur Baur, Bruno Graf k.a.) ne hezitis sendi protestleterojn al la redakcioj de la koncerna gazeto, en kiu aperis negativa, fuŝa aŭ stulta kontribuado pri Esperanto. En iuj kazoj necesis postuli la korektadon de la falsa bildo pri Esperanto. Plej ofte la redaktoroj afable respondis kaj pretis aperigi leteron de leganto aŭ artikolon kun la kontraŭa vidpunkto.

Pergazetara observado: En 1975 CDELI/SES komencis aboni la servon *Argus*, kiu disponigis ĉiujn artikolojn el la svisa gazetaro, kiuj mencias la vorton Esperanto. Tiel povis esti sisteme kolektataj ĉiuj gazetartikoloj, kiuj raportis pri Esperanto aŭ aliaj planlingvoj. La unika gazetartikola kolekto de CDELI, sur kiu baziĝas tiu ĉi raporteto, komenciĝas jam en la jaro 1908, kaj estas, dank' al la regula kunlaborado de pluraj esperantistoj (Claude Gacond, Gabrielle Gacond, Hélène Berger k.a.) ĝisdatigita ĝis antaŭ nelonge. La rikoltadon de la gazetartikoloj akompanas detala statistiko laŭ konkretaj pritaks-kriterioj, kiu donas sciigojn pri la enhavo kaj sinteno de la esploritaj gazetartikoloj.

Eblas konkludi, ke la svisa gazetaro ja abunde konsideris kaj atentis la temon de la neŭtrala universala lingvo, praktikante ian atendo-sintenon rilate la enkondukon de tia lingvo, kiu finfine ne okazis. Observeblas do granda abismo inter la optimismo de planlingvaj adeptoj mem, kiuj, firme kredante je la utileco de la planlingva ideo, klopodis veki publikan atenton kaj varbi por Esperanto pere de la gazetaro, kaj la skeptiko de ĵurnalistoj, neadeptoj, malsimpatiantoj aŭ kontraŭuloj de planlingvoj, kiuj konservis siajn antaŭjuĝojn aŭ eĉ sian rifuzan sintenon vidalvide de la ekzisto aŭ adopto de neŭtrala universala lingvo.

La plena versio de tiu ĉi teksto aperis en: Künzli, Andreas. Universalaj Lingvoj en Svislando: Svisa Enciklopedio Planlingva. – La Chaux-de-Fonds: Svisa Esperanto-Societo; Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale, 2006. – 1129 pĝ., p. 327-333.

Ĉu nederlanda PIV?

Petro de Smedt el Flandrujo estas aŭtoro de la nuntempe gvidaj vortaroj Nederlanda – Esperanto kaj Esperanto – Nederlanda. Tuj post la aperigo de la Nova Plena Ilustrita Vortaro en 2002 (PIV), li komencis prepari plivastigon de la Esperanta-Nederlanda parto. Ĉar nun ĝi estas jam kompleta malneta versio li iom rakontas pri ĝia amplekso, pri lia labormetodo, pri ĝia enhavo. Por germanaj legantoj ni aldonis malmultajn klarigojn.

Principo estas ke absolute ĉiu kapvorto el PIV aperu en ĝi kun kiom eble plej ĝusta nederlanda traduko. Tamen, kiam mi konstatis ke en la franca vortaro de Waringhien (1955, nova eldono kun suplemento 1976) enestas multe da kunmetaĵoj kiuj ne estas troveblaj en PIV, mi decidis ankaŭ enigi kiom eble plej da tiuj vortoj en la novan vortaron. Tial mi devis fari kromlaboron, nome trakribri la tutan vortaron de Waringhien, kaj noti la interesajn enmetindajn vortojn. Necesis fari liston kaj poste alfabeto reordigi ĝin, ĉar Waringhien uzas alian alfabetan ordigon ol PIV. Estis facile retroveblaj la ideoj de Waringhien! Unuflanke li enmetis kunmetaĵojn kiuj liveris taŭgajn vortojn, surbaze de nure fundamentaj radikoj, respondajn al ... ni diru ... iuj neologismoj. Ekzemple ŝipakompani, kiu respondas al konvoj; radaksingo, kiu respôndas al nabo. Plie li enmetis kunmetaĵojn, necesajn por traduki tipajn francajn vortojn, por kiuj oni ne facile, per nura traduko de la partoj, povas produkti bonan esperantan vorton. Foje mi supozis ke temis pri francismoj, sed mi devis ŝanĝi tiun opinion! Ekzemple enestas la vorto skeletarmeo, kiun mi pensis esti francismo. Sed la franca vorto ne aludas skeleton, sed kadron (armée de cadres). Tamen la lumo en mia malhela cerbujo ne jam enŝaltiĝis... ĝis kiam mi konsultis mian dikan amikon van Dale (la plej ampleksa difin-vortaro de la nuntempa Nederlanda) kaj renkontis la nederlandan vorton kaderleger, kun la klarigo: armeo en paca tempo, konsistanta el kerno de profesiaj militistoj, rezervistoj kaj servodevuloj. Jen,

nun ni konas taŭgan vorton por traduki tion! Mi diras taŭgan, ĉar en vortaro ĉiam temas pri taŭga, kaj malofte pri ĝusta, ekzakta! Kvazaŭ ne (krom eble por nomoj de plantoj kaj bestoj?) ekzistas paroj de vortoj, inter du lingvoj, kiuj vere havas ekzakte la tute saman signifon! Estas ĉiam afero de bona, pli bona, plej bona sed tiam vi estos je la limo! Kaj nepre skeletarmeo estas pli bona vorto ol kadroarmeo!

En tiu serio de vortoj pro franca bezono... troviĝas plie multaj vortoj kiuj liveris al mi nekonatajn, sed necesajn, nederlandajn vortojn. La vorto traŭbobrando enestas pro la franca eau-de-vie de marc. Mi ne rakontos la tutan historion, sed finfine mi trovis ke en la nederlanda (vidu van Dale) tiu trinkaĵo nomiĝas marc, tutsimple... eĉ se mi ĉe tiu vorto nur povas tuj kaj aŭtomate pensi pri amiko en Lovenen regiono. Marc, laŭ van Dale, estas: alkohola trinkaĵo farita el la haŭtoj kaj semoj de elpremitaj traŭboj! Do en la nederlanda la franca vorto marc iom evoluis en sia signifo. Alia vorto, aŭ vortgrupo, kiun mi renkontis kaj kiu pensigis min multe, estis sekcia limpado. Mi tute ne konis, kaj ankoraŭ ne konas, la verbon limpi, de kiu mi supozis ke limpado estis substantivigo. Kaj eĉ PIV ŝajnis ne koni ĝin. Do, eble la franca ekvivlento povus helpi min. En la franca estis notita laie forestière. Helpo nula, ĉar mi konas nur lait (lakto), kaj ne laie! Nu, tie bona franca-nederlanda vortaro helpis min, kaj zorgis ke mi komprenu ke ne temas pri limp-ado sed pri limpado (limopado). Do temas pri pado en arbaro, kiu indikas la limon inter du sekcioj, kaj kiu normale estas longa kaj rektlinia. Kredu min aŭ ne, sed en la nederlanda ankaŭ ekzistas vorto por tiu afero! Nome: tra. Jes, tra, kaj ne tralala! Vi eble ankaŭ en la nederlanda preferas vortprovizon surbaze de fundamentaj vortoj? Nu, tiam vi povas nomi ĝin begreningspad, aŭ se vi ne timas neripareble nodigi la langon ankaŭ eblas begreningsbospad aŭ sectiegrenspad (por komencantaj langotordemuloj).

Kara, ĉu vi tuj povas inventi bonan esperantan vorton por la nederlanda

raagbol aŭ la de van Dale preferata ragebol? Ĉe ni oni nomas tiun aferon kutime «kobbegager», do ĉasisto de araneoj. Varingjeno donacas al ni stangobalailo-n. Nepre tute klara vorto, kaj ne kredu vian instruiston se li klopodos vendi al vi ragbalo-n. Mi ĉiam pensis ke Varingjeno estis abstinentulo, sed pro la multaj trinkaĵoj alkoholaj en lia libro, mi komencas dubi. Foje eĉ temas pri ne tute sendanĝeraj trinkaĵoj, ĉar li mencias triptordan brandon, aŭ france tordboyaux. Mi pensis ke ĉiu ajn alkoholaĵo povus esti triptorda sed tamen mi pensis tuj pri la nederlanda foezel. Kaj vere, foezel, laŭ van Dale estas: nepurigita, fuzeloleon enhavanta alkoholo, malbona ĝino. Sed nepre fuzelo ne taŭgas por traduki esperanten, ĉar fuzelo ekzistas, kun nepre ekzakta ĥemia signifo. En mia vortaro, kiun mi tuj kontrolis, troviĝas la du signifoj de foezel. Por la dua signifo mi uzis, kaj ĝi taŭgas, mi pensas, ĝinaĉo. Mi volis uzi la okazon kalumni la karan Middelkoop (kaj pensis pri la trankvilaj akvoj...) sed mi agus maljuste, ĉar ŝi ne menciis ĝin antaŭe. Kaj mi nun havas la konvinkon ke la Varingjena trovitaĵo pli taŭgas, kaj estas pli priskriba, pli bildiga, pli alloga, malpli minaca ol mia ruseca (pro la multaj ŝprucsonoj) vorto, eĉ se ĝi apogas sin sur la franca! Ĉu la esprimo triptorda brando ne estas tute internacie klara? Sola eta manko.... PIV ne mencias la eblecon uzi la vorton tripo por neremaĉuloj, kiaj homoj (nu, eble por Usonanoj jes, ili ja daŭre remaĉas!). Se la tripjo al vi ne plaĉas vi ĉiam povos uzi intestotorda, ĉu?

Aĥ, mi denove jam atingis la limon de akcepteble por artikoleto, kaj ne jam rakontis ion seriozan. Nu, estu tiel! Eble iam pli? Nur ankoraŭ rapide: en la nuna momento tiu nova nederlanda PIV ampleksas jam 563 paĝojn, sed la definitiva versio havos inter 600 kaj 700, do pli ol la kvaroblo de la nuna parto en via vortaro. *Petro De Smedt* *Woordenboek Nederlands-Esperanto-Nederlands* de Petro De Smedt, Antverpeno: Vlaamse Esperantobond 2004, 574 p. <http://users.telenet.be/vortaro/>. Indas instali la programeton ankaŭ por Germanlingvanoj pro ĝia riĉa frazeologio. *Bernhard Pabst*